

Zhāng Jiǔ Líng,  
Hú kǒu wàng lú shān pù bù  
shuǐ

Zhāng Jiǔ Líng,  
La akvofalo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Wàn zhàng hóng quán luò  
tiáo tiáo bàn zǐ fēn  
bēn liú xià zá shù  
sǎ luò chū chóng yún  
rì zhào hóng ní sì  
tiān qīng fēng yǔ wén  
líng shān duō xiù sè  
kōng shuǐ gòng yīn yūn

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala  
en la abismon tie ĉi.  
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala  
akvofumo eliĝas el ĝi.  
De l' altej' nebulvualo  
subeniĝas tie ĉi,  
ĝi ruliĝas tra la valo,  
de la arboj gutas ĝi.  
Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta  
estas arko el odor'  
kaj la akvo estas bruanta  
kvazaŭ tondro en la for'.  
El la verdo de l' arbaro  
rokoj supren levas sin.  
La prafort' de l' vivantaro  
bolas jen en la ravin'.

*Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Zhāng Jiǔ Líng.*

*Arg-987-1990 (2014-04-04 19:34:22)*

*Pri la poeto vidu la retejon <http://ja.wikipedia.org/wiki/eěąde#ũ,,ŋ> respektive [http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang\\_Jiuling](http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling). La titolo signifas: "De Hukou mi rigardas la akvofalon de la monto Lushan".*

*Traduko de la ĉina poemo "Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ" de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-12.*

*Arg-987-1993 (2014-04-07 16:42:27)*